
EL SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista,
Vol. 20 (1969.), n-ro 3/4

625(81) (—16)

## EVOLUO DE NORD-OKCIDENTA RETO DE BRAZILAJ ŜOSEOJ

**Miroslaw Kossakowski, Varsovio, Pollando)**

Brazila Nacia Departemento de Ŝoseoj komencis konstruadon de kelkaj vojoj en la nord-okcidenta parto de la lando. La nord-okcidenta Brazilo




ne estas tro disvolvigita regiono kaj nur ĉe la oceana bordo, inter vegetantaj tropikaj arbaroj, troviĝas plantejaj farmbienoj kaj sufiĉe grandaj urboj.

La interno de la regiono posedas forstojn forĵetantaj foliojn dum seka sezono de la jaro kaj »caatinga« — specifa tipo de la brazila savano. Ĉefaj signifoj de tiuj terenoj estas la paŝtado kaj parte la agrikulturo.

La projekto de la ŝosereta rekonstruado ampleksas 787 kilometrojn, inkluzive la vojfragmenton Aracaju-Maceló (206 km) kun ponto sur la rivero Sao Francisco; la vojfragmenton Ibó-Icó (278 km) kiu kompletigos la signifan vojlinion Salvador-Fortaleza kaj ebligos la eksporton de kultivita longfadena kotono; la vojfragmenton Pasqueira-Salgueiro (302 km) kiu ebligos la elveturigon tra la haveno Recife kotonon, grenon kaj brutaron. Ankaŭ la vojoj Petrolina-Sao Luis, Sobral-Teresina kaj kelkaj aliaj ricevos solidan pavimon. La skiza mapo montras detalojn ligitajn kun rekonstruo de nord-okcidenta reto de brazilaj vojoj.

La regiono estos kunligota per bonkvalitaj ŝoseoj kun sud-brazilaj urboj, kiuj estos la ĉefa vendmerkato de la landa produktaĵo.





EL SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista,
Vol. 20 (1969.), n-ro 3/4

911(049:Atlantis

## ATLANTIS: PLUAJ TEORIOJ

**(D. B. Gregor, Northampton, Anglujo)**

Sendube la artikolo de J. Chvosta en SR Vol. 20, n-ro 2 estos vekinta la apetiton de la legantaro por ekscii pli pri la mistera insulo. Tiun scivolemon mi provos kontentigi per citado el kelkaj antaŭnelonge aperintaj artikoloj [1].

La teorio de A. Schultan, laŭ kiu la rakonto rilatis Tartessus, lokon longe fabeligitan en la greka menso pro ĝia iam granda prospereco [2], trafas en la malfacilaĵon, ke oni malkovris neniajn restaĵojn de granda urbo ĉe la elfluejo de la Rivero Guadalquivir (antikve Baetis).

La nun ĝenerale akceptita teorio identigas Atlantison kun la insulo Kreto. Favore al tio indikas la jenaj faktoj:

1) Supozante, ke ĉiu ŝajne fabela rakonto baziĝas sur iu historia okazaĵo, ni serĉu ion, kio povis kaŭzi la subitan malaperon de granda urbo. Evidente, tio devus esti vulkana erupcio, kia detruis Pompejon. Nu, estas pruvite, ke ĉirkaŭ 1500 a. K. okazis en la egea insulo Santorin (antikve Thera), terura vulkana eksplodo, kies elĵetaĵoj ankoraŭ troviĝas, kiel sur la insulo mem, tiel ankaŭ sur la ĉirkaŭa marfundo. Pro tio, ke la mirinda minoa civilizacio de Kreto ĝuste tiam malaperis, kun la detruo de ties ĉefurbo Knoso, oni emas, sekvante S. Marinatos, kunligi la du okazaĵojn kaj supozi, ke la erupcion akompanis granda tertremo kaj marondo, kiuj detruis Knoson kaj tiel permesis al ĝiaj micenaj vasaloj okupi la insulon [3]. Tiu lasta okazaĵo aperas en la platona rakonto kiel la venko de la atena armeo super la Atlantisanoj.